

6a PASKA DIMANĈO – 1-a de majo 2016

LA SANKTA SPIRITO REMEMORIGOS AL VI ĈION,

KION MI DIRIS AL VI

Komento al la Evangelio di P. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Johano 14, 23-29

[En tiu tempo] Jesuo diris al siaj disĉiploj: „Se iu amas Min, li observos mian vorton, kaj mia Patro amos lin. Mi venos kun mia Patro al li, kaj ĉe li Ni restos. Kiu ne amas Min, ne observas miajn ordonojn. Kaj la vorto, kiun vi aŭdas, estas ne mia, sed de la Patro, kiu sendis Min.

Tion Mi diris al vi, dum Mi estis ĉe vi. Sed mia Patro sendos al vi en mia nomo la Sanktan Spiriton, kiu instruos vin pri ĉio, kaj rememorigos al vi ĉion, kion Mi diris al vi.

Pacon Mi lasas al vi, Mian pacon Mi donas al vi. Mia paco ne estas kiel tiu, kiun la mondo donas. Ne maltrankviliĝu via koro, nek senkuraĝiĝu. Vi aŭdis, ke Mi diris al vi: Mi foriras, sed Mi revenos al vi. Se vi amas Min, vi devus ĝoji pro tio, ke Mi iras al la Patro, ĉar la Patro estas pli granda ol Mi. Ĉi tion Mi diris al vi nun, por ke vi kreu, kiam ĝi okazos.”

En la antaŭa ĉapitro, tri estis la demandoj al Jesuo, de tri disĉiploj; ni ja scias, ke nombro tri montras kompletecon – do ne tri disĉiploj demandis, sed per ili sin esprimis la tuta komunumo. Kaj tiuj tri demandoj estis objĉetoj. Demandis Tomaso: *“Sinjoro, kien Vi iras?”* (Joh 14, 5). Jesuo respondis, ke estas Li la vojo sekvenda (Joh 14,6). Petis Filipino: *“Sinjoro, montru al ni la Patron, kaj al ni tio sufiĉos”* (Joh 14, 8). Jesuo respondis: *“Kiu vidis Min, vidis ankaŭ la patron”* (Joh 14,9), demandis Judaso (ne la Iskarioto, la samnoma disĉiplo): *“Sinjoro, kiel okazis, ke Vi elmontras Vin al ni kaj ne al la mondo?”* (Joh 14, 22). Tio, pli ol demando, estis tento: Judaso postulis, ke Jesuo manifestiĝu kiel la atendita mesio.

Kaj jen, en ĉi tiu ĉapitro estas la fina respondo de Jesuo, unu el la elstaraj pintoj de la evangelio de Johano: ĝi estas aserto kiu, se bone komprenita, tute ŝanĝas la rilaton kun Dio, kaj konsekvence kun ĉiuj. Ni ĝin legu.

[En tiu tempo] Jesuo diris al siaj disĉiploj: „Se iu amas Min, li observos mian vorton, kaj mia Patro amos lin. Mi venos kun mia Patro al li, kaj ĉe li Ni restos. Kiu ne amas Min, ne observas miajn ordonojn. Kaj la vorto, kiun vi aŭdas, estas ne Mia, sed de la Patro, kiu sendis Min.”. Observi Lian vorton signifas, igi, kiel Li, sian vivon amdonaco por servi la aliajn. Nu, la respondo de Dio estas: *“Mi venos kun mia Patro al li, kaj ĉe li Ni restos”*. Tio ne estas promeso por postmorta estonteco; tio estas la respondo de la Patro al ĉiuj, kiuj sekvas Jesuon. En la prologo al sia evangelio Johano skribis, ke Dio, tiu vorto, ekloĝis inter ni, en ni (Joh 1, 11). Nun Jesuo diras ion eksterordinaran: ĉiu kiu, kiel Li, direktas sian vivon al servado de la aliaj, tiu estas amata de la Patro, kaj ke Li mem, kun la Patro, venas al tiu ulo kaj ekloĝas ĉe li.

De ĉiuj Jesuo petas, ke Li estu akceptata en iliaj vivoj, kaj ke kun Li ili kunfandiĝu, ke ilia amkapablo plilarĝiĝu, tiel igante ĉiun personon kaj ĉiun komunumon la sola vera sanktejo, de kiu disradias la mizerikorda amo de Dio.

Do ne plu ekzistas iu templo, kie loĝas la Sinjoro: ĉiu kreitaĵo estas la templo, kie Dio manifestiĝas. Tiu aserto de Jesuo estas gravega. Dio ne estas io ekstera al nia vivo, Dio ne estas io malproksima, Dio estas en la intimeco de la homo, kaj tia Dio, intima por la homo, intima en la homo, manifestiĝas kiam la homo estas pli homeca.

Ju pli la homo estas homa, des pli manifestiĝas la dia eco en li. Kaj tiu aserto de Jesuo ne rilatas nur la homan vivon, sed ankaŭ la pason tra la morto. Oni kutimas diri, ke kiam oni mortas oni iras al la ĉielo, oni reiras al la hejmo de la Patro. Ne: la ĉielo estas en ni; ni ne iras al la hejmo de la Patro, la hejmo de la Patro estas ni.

Tio estas la eksterordinara aserto de Jesuo. La sekvo estas: *“Kiu ne amas Min, ne observas miajn ordonojn”*. Tiu, kies vivo ne iĝis amservado por la bono de la aliaj, havas nenion komunan kun Jesuo. *“Kaj la vorto, kiun vi aŭdas, estas ne mia, sed de la Patro, kiu sendis Min.”*

La eminentuloj klopodis dividi Jesuon de la Patro; male Jesuo asertas ĉi tie, ke inter ili estas unueco perfekta, ĉar kune ili daŭrigis la kreaĵon agadon, transdonante vivon, redonante vivon, riĉigante la vivon de aliaj. Kaj ankoraŭ Jesuo: *“Tion Mi diris al vi, dum Mi estis ĉe vi. Sed mia Patro sendos al vi en Mia nomo la Sanktan Spiriton...”, Kiu...”* Kio estas la Sankta Spirito? Ĝin oni nomas ankaŭ la Konsolanto aŭ la Sukuranto”.... *instruos vin pri ĉio,*

kaj rememorigos al vi ĉion, kion Mi diris al vi.” Tio garantias la sekurecon al la kristana komunumo, al la eklezio.

Do la Spirito konsolas kaj sukuras, kaj tio okazas antaŭ la momento de la bezono. Jesuo intencas trankviligi Sian komunumon: havante ĉe si tian helpanton, la eklezio ĉiam kapablos trovi novajn respondojn al novaj bezonoj; estas tiu la signifo de la frazo *“la Sankta Spirito instruos vin pri ĉio, kaj rememorigos al vi ĉion, kion Mi diris al vi*: la eklezio povos alfronti novajn situaciojn, adaptante al ili la mesaĝon de Jesuo. Fine Jesuo deklaras: *“Pacon Mi lasas al vi, Mian pacon Mi donas al vi”*. Ne temas pri bondezira saluto, kvazaŭ ĝi sonus *“la paco estu kun vi”*: ĝi estas donaco, kaj la paco estas tio, kio donas plenecon al la vivo. Kaj Li precizigas: *“Mia paco ne estas kiel tiu, kiun la mondo donas,”*.

La bondeziro por paco estis la kutima adiaŭa saluto. Jesuo ne intencas adiaŭi, sed ankoraŭ kunesti. Kaj al la distingo *“Mia paco ne estas kiel tiu, kiun la mondo donas”*. Li aldonas: *“Ne maltrankviliĝu via koro, nek senkuraĝiĝu”*. Al la disĉiploj restu ne la timo, sed la amo.

“Vi aŭdis, ke Mi diris al vi: Mi foriras, sed Mi revenos al vi. Se vi amus Min, vi devus ĝoji pro tio, ke Mi iras al la Patro, ĉar la Patro estas pli granda ol Mi”. Li ne zorgas pri Sia suferado, sed pri ilia bono. Kiam Li estos ĉe la Patro Li ne estos pli malproksima de ili, sed pli intima kun ili. *Ĉi tion Mi diris al vi nun, por ke vi kredu, kiam tio okazos.*”

En tiu lasta frazo estas kaŝita defio. Jesuo estos kondamnita kiel malbenito de Dio. Do la disĉiploj decidu: Ĉu ili fidu la ĉefpastron aŭ Jesuon? Se ili fidos Jesuon, ili ne povos kredi je la religiaj institucioj, kiuj mortkondamnis la filon de Dio.